# Esperanto - La Bitbulteno 107

esperanto.es

**NOS VEMOS EN PORTUGALETE**

Queda poco más de una semana para el comienzo del gran encuentro de los esperantistas españoles y de muchos visitantes.

Recordamos que entre el 14 y el 18 de este mes de julio, tendrá lugar el 84º Congreso Español de Esperanto en la localidad vizcaína de Portugalete, muy cerca de Bilbao. El encuentro está organizado por el Grupo Esperantista de Bilbao, que este año está celebrando el 120 aniversario de su fundación.

En la página web kongreso.esperanto.es puedes ver los detalles necesarios, incluyendo el programa final, o las excursiones previstas. También puedes acceder al formulario de inscripción, y la lista de apuntados (ya más de ciento veinte hasta la fecha). Además, en esta página puedes ver dos vídeos (en castellano y esperanto) sobre el congreso.

Ven a disfrutar de un ambiente único.



**Y ADEMÁS DOS CONGRESOS INTERNACIONALES**

Además del Congreso Español, otros dos encuentros internacionales van a tener lugar en nuestro país.

Entre el 19 y el 26 de julio, justo tras el encuentro de Portugalete, se celebrará en León el congreso de la Asociación Anacional Mundial (SAT). En esta página puedes ver los detalles necesarios, y también puedes inscribirte ya. El programa tendrá como eje el tema "Paz y guerras" (con ocasión del 90 aniversario del inicio de la guerra civil española), y lo puedes consultar aquí.

Un poco más tarde, entre el 9 y el 16 de agosto, tendrá lugar en Tiana (muy cerca de Barcelona) el Congreso Internacional de Jóvenes Esperantistas (IJK). Puedes visitar la página web ijk2026.tejo.org, para leer toda la información y apuntarte mediante el formulario de inscripción. Tendrás un programa muy completo, bajo el tema general "Naturaleza a través de los ojos humanos". El congreso no está limitado solo a jóvenes, e incluirá un encuentro de veteranos bajo el nombre "Rejuniĝu".

Son dos oportunidades únicas, que no te puedes perder si deseas practicar esperanto en buena compañía.




**CONCURSO DE FOTOS, ¡CON PREMIOS!**

Este mes de julio se celebra en Wikimedia (sitio web hermano de la más conocida Wikipedia) un concurso llamado «Vikio amas ZEOjn». Se trata de un concurso fotográfico internacional para difundir el patrimonio esperantista por todo el mundo a través de los proyectos de Wikimedia (principalmente Wikipedia y Wikimedia Commons). Su objetivo es documentar los ZEOs (Objetos Zamenhof/Esperanto, es decir, calles, monumentos, placas y otros lugares físicos ligados al esperanto) y el patrimonio esperantista a nivel mundial.

Para participar, solo tienes que fotografiar lugares relacionados con el esperanto y subir la imagen a la página web de Wikimedia.

Habrá premios para las mejores o más interesantes fotografías. Además, gracias al patrocinio de la Fundación Esperanto, habrá premios muy especiales para las dos mejores fotografías de España y de países de habla hispana.

Consulta la información básica en: https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2026/es. Allí encontrarás el procedimiento, el reglamento, los premios, los criterios de evaluación e incluso ejemplos de otro concurso similar organizado en 2018. El concurso también está abierto a personas que no hablan esperanto, por lo que encontrarás la información básica en otros idiomas, como español, catalán y asturiano.

Aprovecha esta oportunidad para difundir el patrimonio del esperanto, el llamado «esperanto físico». ¡Tienes tiempo hasta el 31 de julio!

## NUEVO LIBRO SOBRE CATALOGACIÓN

Se ha publicado la segunda parte del *Manual de Catalogación* en esperanto, cuyo autor es Ana Manero, responsable de la Biblioteca Juan Régulo Pérez de la Federación Española de Esperanto. Esta parte trata sobre la catalogación de publicaciones seriadas y complementa la primera, publicada en 2024, sobre la catalogación de monografías, cuya segunda versión actualizada se publica también ahora simultáneamente. El documento sobre el formato MARC21 también se actualizó este año para incluir los campos necesarios para la catalogación de publicaciones seriadas. Los libros están digitalizados y disponibles gratuitamente en Bitoteko (el repositorio digital de la Federación):

- Manual de Catalogación. Publicaciones seriadas. Versión 01. 2026
- Manual de Catalogación. Monografías. Versión 02. 2026
- Formato MARC 21. Versión 02. 2006

## EL GRUPO ESPERANTISTA DE TERUEL CELEBRÓ SU DÉCIMO CUMPLEAÑOS

El grupo esperantista de Teruel, Liberanimo, celebró sus 10 años de vida, con una conferencia en la sede de la UNED de Teruel a finales de mayo. En el local se presentó también una exposición de libros, novelas y cómics editados en esperanto. El encargado de ofrecer la conferencia fue el esperantista turolense Alberto Granados, impulsor de la creación del grupo. Liberanimo realizará varias actividades de hermanamiento para celebrar su décimo aniversario.

Del aniversario se hizo eco el periódico local, Diario de Teruel.



**La asociación Liberanimo celebra el décimo aniversario de su fundación**

Los esperantistas turolenses organizaron una conferencia

M. A. A. G.
**Teruel**

La asociación turolense de esperantistas Liberanimo ofreció este miércoles una charla divulgativa en el interior de la Uned, donde se reunieron algunas personas interesadas en este lenguaje universal y se expusieron varios ejemplares de libros, novelas y cómics editados en esperanto.

El encargado de ofrecer la conferencia fue el esperantista turolense Alberto Granados, impulsor de la creación de Liberanimo. Esta asociación que reúne a los hablantes de esperanto de Teruel ha celebrado durante el mes de mayo el décimo aniversario de su fundación. Liberanimo realizará varias actividades de hermanamiento para celebrar su décimo aniversario.

Liberanimo, que en esperanto significa "espíritu de libertad", tiene su precedente en 1903, la primera comunidad de esperantistas turolenses que se formó en Albarracín. En tiempos más recientes, Alberto Granados comenzó a impartir cursos de esperanto en 2012 en los locales de la antigua asociación de vecinos de San Julián, formando de nuevo un grupo de hablantes en torno a esas reuniones.

La comunidad fue creciendo hasta que en primavera de 2016 decidieron constituir formalmente la asociación Liberanimo e inscribirse en el registro de la Federación Española de Asociaciones de Esperanto. Como acto central de esa constitución, los turolenses celebraron el 76º Congreso Nacional de Esperantistas del 23 al 25 de junio de 2016, en el que se dieron cita más de 200 esperantistas, la mayor parte de ellos de España pero también de numerosos lugares del resto de Europa.

Imagen de la reunión celebrada este miércoles

## VISITA DEL VICEPRESIDENTE DE UEA EN MADRID

Entre el 21 y el 23 de abril, el vicepresidente de la Asociación Universal del Esperanto, Seán Ó Riain, visitó Madrid para participar en una conferencia sobre política lingüística en la Universidad Complutense. Acudió como responsable de multilingüismo del Ministerio de Asuntos Exteriores de Irlanda, pero durante sus intervenciones mencionó el esperanto en varias ocasiones, en particular resaltando sus ventajas en la mejora del aprendizaje de idiomas.



## 12 DE JULIO, DÍA DE LA ESPERANZA

El año 2025 las Naciones Unidas celebraron, por primera vez, el 12 de julio como el Día Internacional de la Esperanza. Esta fecha especial se estableció para recordar a la comunidad internacional que las Naciones Unidas se fundaron en 1945 con un espíritu de optimismo tras la devastación de la Segunda Guerra Mundial y con la esperanza de que la humanidad jamás volviera a dejarse dominar por tanto odio, crueldad y sufrimiento humano.

Con ocasión de la segunda edición del Día, la Asociación Universal de Esperanto ha emitido un mensaje institucional, que puedes leer en esperanto y también en su traducción al castellano en este enlace.




**ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Aprovechando la celebración del Congreso de España en Portugalete, la Federación Española de Esperanto celebrará su Asamblea General ordinaria el próximo 17 de julio, a las 10 horas. Los integrantes de la asociación ya han recibido la convocatoria por medio de la revista oficial "Boletín". Los socios que no puedan asistir podrán delegar su voto dirigiendo un mensaje al secretario.

Y si (aún) no eres miembro, pues ya sabes cómo solucionar ese problema :-)

**NI RENKONTIĜOS APUD BILBAO**

Restas iom pli ol unu semajno ĝis la komenco de la granda kunveno de hispanaj esperantistoj kaj de niaj multaj vizitantoj.

Ni memorigas vin, ke la 84-a Hispana Esperanta Kongreso okazos inter la 14-a kaj 18-a de julio en Portugalete, urbo en la provinco Biskajo, tre proksime al Bilbao. La eventon organizas la Esperanto-Grupo de Bilbao, kiu ĉi-jare festas la 120-an datrevenon de sia fondiĝo.

Vi povas trovi ĉiujn necesajn detalojn, inkluzive de la fina programo kaj la planitaj ekskursoj, en la retejo kongreso.esperanto.es. Vi ankaŭ povas aliri la aliĝilon kaj la liston de registritaj partoprenantoj (jam pli ol 120 ĝis nun). Krome, vi povas spekti du filmetojn pri la kongreso (en

la hispana kaj en Esperanto) en ĉi tiu retejo.

Venu kaj ĝuu unikan etoson!




**KAJ ANKAŬ DU INTERNACIAJ KONGRESOJ**

Krom la Hispana Kongreso, du pliaj internaciaj kongresoj havos sian lokon en Hispanio.

inter la 19a kaj la 26a de julio, tuj post la hispana kongreso kaj sufiĉe proksime, en Leono, okazos la Kongreso de la Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) . En ĉi tiu paĝo vi povas legi la necesajn detalojn kaj vi ankaŭ povas registriĝi. La programo havos kiel bazan akson la temon "Paco kaj Militoj" (okaze de la 90a datreveno de  la komenco de la hispana intercivitana milito), kaj vi povas ĝin trovi tie ĉi.

Iom poste, inter la 9-a kaj la 16-a de aŭgusto, okazos tre proksime de Barcelono (konkrete en monaĥejo en la urbeto Tiana) la Internacia Junulara Esperantista Kongreso (IJK). Vi povas viziti la retejon ijk2026.tejo.org por legi ĉiujn informojn kaj registriĝi per la aliĝilo. Vi ĝuos tre riĉan programon, sub la temo "Naturo el homaj okuloj". La kongreso ne restos limigita al junuloj, kaj inkludos paralelan renkontiĝon de pli veteranaj aktivuloj sub la nomo "Rejuniĝu".

Temas pri du unikaj ŝancoj, kiujn vi ne rajtas maltrafi se vi deziras praktiki Esperanton en bona kompanio.






## KONKURSO DE FOTOJ, KUN PREMIOJ!

Dum tiu ĉi monato julio estas kunvokita konkurso en Vikimedio (frata retejo de la pli konata Vikipedio), nomata "Vikio amas ZEOjn". Ĝi estas internacia fotokonkurso por diskonigi la Esperanto-heredaĵon ĉirkaŭ la mondo pere de Vikimediaj projektoj (ĉefe Vikipedio kaj Vikimedia Komunejo). Ĝi celas dokumenti ZEOjn (tio estas, Zamenhof/Esperanto-Objektojn) kaj la Esperanto-heredaĵon ĉirkaŭ la mondo.

Por tio, vi nur devas foti tiujn lokojn ligitajn al Esperanto, kaj alŝuti la rezulton al la retejo de Vikimedio.

Estos premioj por la plej bonaj aŭ interesaj fotoj. Kaj ni speciale atentigas ke estos tre altiraj premioj por la du plej bonaj fotoj en Hispanio kaj hispanparolantaj landoj, danke al la sponsorado de Fondaĵo Esperanto.

Vidu la bazajn informojn en: https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2026/eo. Tie aperas la proceduro, la regularo, la premioj, la juĝkriterioj kaj eĉ ekzemploj de alia simila konkurso organizita jam en 2018. La konkurso estas malferma ankaŭ al neesperantistoj, kaj tial vi trovos la bazajn informojn ankaŭ en aliaj lingvoj, inklude de la hispana, la kataluna kaj la astura. Vi povas do ĝin diskonigi ekster la esperantistaj rondoj.


Profitu tiun ĉi okazon diskonigi la heredaĵon de Esperanto, la t.n. "fizikan Esperantujon". Vi havas tempon ĝis la 31a de julio!




## NOVA LIBRO PRI KATALOGADO

Jam aperis la dua parto de la *Manlibro pri katalogado*, kies aŭtoro estas Ana Manero, zorganto de la Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio. Temas ĉi-foje pri katalogado de seriaĵoj kaj ĝi komplementas la unuan parton, publikigitan en 2024, pri katalogado de monografioj, kies dua ĝisdatigita versio aperas nun, samtempe kun la parto pri seriaĵoj. Ankaŭ ĝisdatiĝis ĉi-jare la dokumento pri la Formato MARC21 por inkludi la kampojn necesajn por katalogi seriaĵojn. La libroj estas bitaj kaj libere disponeblas en Bitoteko:

- Manlibro pri katalogado. Seriaĵoj. Versio 01. 2026
- Manlibro pri katalogado. Monografioj. Versio 02. 2026
- Formato MARC 21. Versio 02. 2006






## LA GRUPO ESPERANTISTA DE TERUELO CELEBRIS SIAN DEKAN DATREVENON

Liberanimo, la esperantista grupo de la aragona urbo Teruelo, festis sian dekan datrevenon per prelego en la loka sidejo de la UNED (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado), fine de majo. Ĝin akompanis ekspozicio de libroj, romanoj kaj bildstrioj eldonitaj en Esperanto. La prelegon prezentis Alberto Granados, prezidanto de la grupo. Liberanimo planas organizi ĝemeliĝajn agadojn por festi sian dekan datrevenon.

La loka ĵurnalo Diario de Teruel raportis pri la datreveno.




## VIZITO DE VICPREZIDANTO DE UEA EN MADRIDO

Inter la 21-a kaj 23-a de aprilo vizitis Madridon la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Seán Ó Riain, por kontribui al konferenco pri lingvopolitiko en la Universitato Complutense. Li venis kiel estro pri plurlingveco de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Irlando, sed dum siaj paroladoj li plurfoje menciis Esperanton, aparte pri ĝiaj propedeŭtikaj ecoj.





**12 DE JULIO, TAGO DE LA ESPERO**

En la jaro 2025, unuafoje, Unuiĝintaj Nacioj festis la 12-an de julio kiel Internacian Tagon de Espero. Tiu speciala tago estis establita por memorigi la mondan komunumon, ke Unuiĝintaj Nacioj estis fondita en la jaro 1945 en spirito de optimismo post la amasa detruo de la Dua Mondmilito, kaj kun espero, ke neniam plu la homaro permesu al si esti superita de tia malamikeco kaj krueleco kaj homa suferado.

Okaze de la dua celebrado de tiu Internacia Tago, Universala Esperanto-Asocio sendis institucian mesaĝon kiun vi povas legi [en tiu ĉi ligilo] (hispane [tie ĉi]).




**ĜENERALA KUNVENO DE HEF**

Okaze de la Hispana Kongreso en Portugalete, Hispana Esperanto-Federacio celebros sian ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, la 17an de julio, je la 10a horo. La anoj de la asocio jam ricevis la kunvokon pere de la oficiala revuo "Boletín". La anoj kiuj ne povos ĉeesti rajtas delegi sian voĉdonon per mesaĝo al la sekretario.

Kaj se vi (ankoraŭ) ne estas ano, nu, vi jam scias [kiel solvi tiun problemon] :-)